# TEA-BULTENO

7A JARO — NOVEMBRO - DECEMBRO 2004 — NUMEROJ 11-12

## Programo en Tea - Novembro

| | |
|---|---|
| 02 - mardo | 20.00 - Laboroj por Krip-ekspozicio |
| 05 - vendredo | 20.00 - La Pekina UK (filmo) |
| 09 - mardo | 20.00 - Laboroj por Krip-ekspozicio |
| 12 - vendredo | 20.00 - Renkontiĝo kun fama esperantisto: Franko LUIN |
| 16 - mardo | 20.00 - Laboroj por Krip-ekspozicio |
| 19 - vendredo | 20.00 - *Lecturae Dantis* en Esperanto |
| 21 - dimanĉo | Marcelo Trampuh invitas vin al gustumado de nova vino en Kaštelir! |
| 23 - mardo | 20.00 - Laboroj por Krip-ekspozicio |
| 26 - vendredo | 20.00 - Trafoliumante PIV-on! |
| 30 - mardo | 20.00 - Laboroj por Krip-ekspozicio |

## Programo en Tea - Decembro

| | |
|---|---|
| 03 - vendredo | 20.00 - Ni praktiku Esperanton, tradukante artikolon itallingvan esperanten (aŭ inverse)! |
| 07 - mardo | 20.00 - Preparlaboroj |
| 10 - vendredo | 20.00 - ZAMENHOFA TAGO: denove en Ĉinio, per diapozitivoj |
| 14 - mardo | 20.00 - Preparlaboroj |
| 17 - vendredo | 20.00 - ZAMENHOFA TAGO: Kion ni scias pri Li? |
| 21 - mardo | 20.00 - Bondezira Festo kun Paĉjo Kristnasko |
| **24 - vendredo** | **Sidejo fermita** |
| 28 - mardo | 20.00 - Ni kune adiaŭu la Jaron 2004$^{an}$! |
| **31 - vendredo** | **Sidejo fermita** |

**Ĉiumarde, ekde la 18$^{a}$ h, progresiga kurso**
**Ĉiumerkrede, ekde la 18$^{a}$h, Koruso VERDAJ ANĜELOJ**
**Ĉiuĵaŭde, ekde la 18h30, baza kurso de Esperanto**

**Al vi ĉiuj korajn bondezirojn de Feliĉaj Festotagoj!**
Ni revidos nin vendredon la 7$^{an}$ de januaro 2005!

**Kara Leganto!**
En la maldekstra kolumno aperas la programo kiun ni planis okazigi novembre kaj decembre. Sed sen ĉeestantoj, ne estos facile (kaj eĉ tute sensence!) realigi ĝin, ĉu ne? Tial espereble inter la diversaj proponitaj eroj vi sukcesos trovi ion interesan kaj allogan, por en ĝi partopreni. En ĉi tiuj du lastaj monatoj de la 2004$^{a}$ jaro estos ebleco kaj simple distriĝi, spektante filmon aŭ diapozitivojn, kaj iom pli serioze praktiki nian lingvon (per trafoliumado de PIV, legado de INFERO, ktp). Ĉirilate, fakte nepras, por ni ĉiuj, pliprofundigi niajn konojn kaj pri la lingvo mem kaj pri ties historio. Ĉu vi konsentas pri ĉio ĉi? Se jese, nu, mi atendas vin ĉe TEA-sidejo!

Jam nun areto da personoj estas okupiĝanta pri restaŭrado de proksimume centjara kripo, kiu majestos, pro siaj beleco kaj originaleco, inter la aliaj kripoj kiujn ni, ankaŭ ĉijare, ekspozicios dum decembro. Pri koncerna inaŭguro ni informos vin, sed intertempe ni bezonas viajn helpon kaj ideojn por preparado de propagandiloj, por muntado de la ekspozicio mem ks.

En decembro kompreneble ne mankos la tradicia memorfesto honore al nia Majstro, ĉifoje kunlige al la datreveno de la unua Rezolucio pri Esperanto, favore akceptita de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, en Montevideo, la 10$^{an}$ de decembro 1954. Por tion inde festi ni aranĝos publikan kunvenon kunlabore de la CENTRO UNESKO de Trieste.




Fine, vizitos nin Paĉjo Kristnasko, kiu disdonos malavare donacojn al ĉiuj: tio estos marde la 21$^{an}$ de decembro, dum je la 28$^{a}$, ni kuntostos je la baldaŭ naskiĝonta 2005$^{a}$ Jaro.

Ĝis la revido plej baldaŭ!

Via Bulteno-redaktantino *Elda Doerfler*!

---



Dimanĉon la 21$^{an}$ de novembro okazos ekskurso al Kaštelir, kie atendos nin niaj karaj gastigantoj, Kata kaj Marĉelo. Kunvenos ĉe ili esperantistaro el Rijeka kaj el Trieste: jen okazo por kunestadi, babiladi, programadi, inviti niajn amikojn al Zamenhof-tagoj en Triesto ktp ktp.

Ni ekiros je la 8h30, ĉar rendevuo estos proksimume je la 10$^{a}$ h. Post kafumado kaj babilado, je la 12$^{a}$ horo ni manĝ(et)os akompane de certe bongustega nova vino. Se vetero permesos, Marĉelo enprogramis ankaŭ ekskurson al Novigrad (Cittanova). Ĉu ankaŭ vi intencas veni kun ni? Se jes, bonvolu anonciĝi ĉe TEA-sekretario!



# Lingva Seminario
# Firenze 6-7 novembro 2004

ITALA ESPERANTO-FEDERACIO kunlabore kun FLORENCA ESPERANTO-ASOCIO, organizas por la 6ª kaj 7ª de novembro lingvan seminarion kiu antaŭvidas du instrunivelojn. Tiuj estas la jenaj:

**1) Baza** por tiuj, kiuj havas nur esencan konon de Esperanto kaj intencas plibonigi siajn lingvokonon kaj parolkapablon;

**2) Progresiga** por tiuj, kiuj jam parolas Esperanton sed deziras plibonigi la konon de la lingvo.

## 1) Programo de baz-nivela Seminario

**Sabato**

| | |
|---|---|
| 09.30-10.00 | Loĝiga servo |
| 10.00-11.00 | Parolu kun Anna Löwenstein |
| 11.00-11.30 | Kafpaŭzo |
| 11.30-12.30 | Reviziu kun Luisa Madella |
| 13.00-14.30 | Tagmanĝo |
| 14.30-16.00 | Pluparolu kun Anna Löwenstein |
| 16.00-16.30 | Kafpaŭzo |
| 16.30-18.00 | Plureviziu kun Luisa Madella |
| 18.00-19.30 | *Kontraŭ ŝajnaj amikoj nin protektu Dio!* Ludu kun Renato Corsetti |
| 20.00 | Libera vespermanĝo |

**Dimanĉo**

| | |
|---|---|
| 09.00-10.00 | Parolu plue kun Anna Löwenstein |
| 10.00-11.00 | Reviziu plue kun Luisa Madella |
| 11.00-11.30 | Kafpaŭzo |
| 11.30-12.30 | *Ĉi tiu Esperanto ŝajnas turka.* Pluludu kun Renato Corsetti |

## 2) Programo de progresig-nivela Seminario

**Sabato**

| | |
|---|---|
| 09.30-10.00 | Loĝiga servo |
| 10.00-11.00 | Vortadoj kaj parolado pri artikoloj en la revuo MONATO kun Ranieri Clerici |
| 11.00-11.30 | Kafpaŭzo |
| 11.30-12.30 | Vort-farado kun Renato Corsetti |
| 12.30-13.00 | Sed kion signifas *biforo* kaj *kapitelo*? Vortoj por interpreti kun Ranieri Clerici |
| 13.00-14.30 | Tagmanĝo |
| 14.30-16.30 | Turisma interpretado 1 (Michela Lipari/Cristina De Giorgi) |
| 16.30-17.00 | Kafpaŭzo |
| 17.00-18.00 | Konsideroj pri la turisma interpretado 1 (Michela Lipari/Cristina De Giorgi) |
| 18.00-19.30 | Se vi kuraĝas, parolu pri *biforoj* kaj *kapiteloj* kun Ranieri Clerici |
| 20.00 | Libera vespermanĝo |

**Dimanĉo**

| | |
|---|---|
| 09.00-10.00 | Turisma interpretado 2 (Michela Lipari/Cristina De Giorgi |
| 10.00-11.00 | Konsideroj pri la turisma interpretado 2 (Michela Lipari/Cristina De Giorgi) |
| 11.00-11.30 | Kafpaŭzo |
| 11.30-12.30 | Fino bona, ĉio bona: surpriza preleganto en Esperanto. |

**Sidejo**: La seminario okazos en Instituto GOULD en Florenco, Strato de' Serragli, 49. En tiu kvartalo la trafiko estas limigita kai ne estas permesate, al la neloĝantoj, eniri aŭtomobile. Por atingi la sidejon el la stacidomo oni povas piediri (proksimume 15 min.) aŭ veturi per busoj 36 aŭ 37, kiuj haltas proksime de la stacidomo, kaj oni devas elbusiĝi je la dua haltejo post la transiro de rivero Arno.

**Aliĝkotizo**: 10 Eŭroj por persono (senpaga por studentoj ĝis 21 jaroj).

**Loĝado**: estas antaŭvidita en la Instituto GOULD laŭ jenaj prezoj persone, kiuj ne inkluzivas matenmanĝon:

- ➔ unulita ĉambro kun banejo - 40 € (laŭ disponebleco);
- ➔ dulitaj ĉambroj kun banejo - 32 € (laŭ disponebleco);
- ➔ trilitaj ĉambroj kun banejo - 23 €.

**Restoracio**: eblos manĝi en apuda restoracio je antaŭfiksita prezo (proksimume 20 €). Mendo kaj pago de la restoracio eblos je la alveno.

**Aliĝkondiĉoj**: bonvolu tuj kontakti unu el la organizantoj informante pri via intenco partopreni en la seminario kaj tuj pagi aliĝon per pĉk 37312204 je la nomo de ITALA ESPERANTO-FEDERACIO - via Villoresi 38 - 20143 Milano - tel 02 58100857. Se vi ne ricevos atestilon pri viaj pagoj, bonvolu kunporti pagkvietancon.

**Informoj**: bonvolu viziti la retejon: www.esperanto.it aŭ vin turnu rekte al Michela Lipari, tel: 3483039924, retadreso: michela.lipari@libero.it aŭ al Riccardo Pinori - tel: 3387711429, ret-adreso: napinori@tin.it

# Grava por italoj!

## Alvoko de Mikaelo Lineckji el Kijivo (Ukrainio)

Li estas laboranta por okazigi fine de majo (23-30) 2005 FESTIVALON DE KULTUROJ, okaze de kiu li ŝatus prezenti ankaŭ la italan kulturon! Estas bezonata rakonto aŭ montro de iu(j) nacia(j) moro(j), kutimo(j). Eblos ankaŭ prezenti iujn specifajn italajn manĝaĵojn, kaj kantojn, dancojn, kompreneble tiujn popolajn. Plano estas aranĝi tiun Festivalon kunlabore kun la urbodoma instanco.

Interesiĝantoj povas turni sin al: Mikaelo Lineckij, UEA-Delegito por Kijivo (Ukrainio) - ml@espero.kiev.ua, rezerva retadreso: esperanto@uafree.net; ICQ 149228024 (plej ofte inter 5 kaj 6 horoj laŭ GMT). Hejma telefono +38-044-4320743, poŝtelefono +38-039-2477483.

Post kelka tempo eblos trovi pli da detaloj ĉe: www.espero.kiev.ua - "Aranĝoj"

## *Mallonge pri...*

**Fabelo de Karina MacGill premiita en Finnlando** La 18$^{an}$ de oktobro oni publikigis la nomojn de la premiitoj en la fabelkonkurso organizita de Päätalo-Instituto en Finnlando. En la konkurso partoprenis preskaŭ naŭcent finnlingvaj fabeloj kaj deko da esperantlingvaj. La unuan lokon de la finnlingva fabelkonkurso de Päätalo-Instituto ricevis Niina Pelkonen. La premion LA FABELO INTERNACIA gajnis Karina MacGill el Hungario per sia fabelo MAKULUL'.

**Profesia entrepreno pri internacia komerco** lanĉas servojn en Esperanto! FELISO estas brazila entrepreno, kiu helpas aliajn firmaojn, precipe etajn kaj mezgrandajn, eniri en internacian komercon. Nun, dank' al Esperanto, ĝi pretas proponi tiujn servojn al individuoj kaj firmaoj tra la tuta mondo. Ĝi lanĉis siajn servojn en Esperanto, kune kun propono pagi esperantistojn por kunlaboro. Pliajn informojn kaj la adreson de la retejo de FELISO eksciu ĉe: http://gxangalo.com/noticoj/1697.html

**Kajto ricevis prestiĝan premion** La estraro de la Germana FAME-Fondaĵo ĉi-jare aljuĝis sian 9$^{an}$ kulturpremion al la konata muzikgrupo KAJTO. Tiel, la unuan fojon, muzikartistoj ricevas premion je valoro de 5.000 eŭroj. La ĝisnunaj premiitoj estas: KULTURA CENTRO ESPERANTISTA/C.D.E.L.I., Ito Kanzi (Ludovikito), Richard Schulz / Bruno Vogelmann, HEROLDO DE ESPERANTO, Spomenka Štimec, Marjorie Boulton, William Auld kaj la aŭtoroj de ADORU, la pastroj A. Burkhardt, B. Eichkorn kaj A. Kronenberger. La kvar kanzonistoj de KAJTO ricevas la premion pro siaj atingoj "kiel sukcesaj ambasadoroj de la Esperanto-kulturo en kaj ekster Esperantujo". La premiotransdono okazis oktobre en la urba biblioteko de la sudgermana urbeto Aalen en ĉeesto de la urbestro, estrarano de la sponsora banko, invititaj gastoj kaj la loka gazetaro. *El Libera Folio*

**Vjetnama registaro honoras esperantiston** La prezidanto de la JAPANA PACDEFENDA ESPERANTA ASOCIO (JPEA), Hideo Kumaki, ricevis la amikecan medalon de la Vjetnama ŝtato pro duonjarcento da kontribuoj al amikeco inter la japana kaj vjetnama popoloj. Post la milito en Vjetnamio Hideo Kumaki precipe helpis blindulojn kaj viktimojn de la milito kiuj suferis pro misuzo de kemiaĵoj. En la jaro 2000 li kreis organizaĵon pere de kiu japanaj esperantistoj helpas Vjetnamion. Lastatempe la organizaĵo, kunlabore kun VJETNAMA ESPERANTO-ASOCIO, konvinkis japanan help-organizaĵon fondi blindulan bibliotekon en Hanojo. En la nova biblioteko oni produktas multe da brajlaj (punktoskribaj) libroj por vjetnamaj blinduloj. Jam aperis pli ol 500 libroj.

*El Libera Folio*

**Konsilantino-Esperantisto en Litovio** Ekde la 12$^{a}$ de julio 2004 en Litovio oficas nova Ŝtatprezidento Valdas Adamkus. Lia konsilantino pri ekonomia strategio iĝis esperantistino Nijole Zambaite. Perfekte ŝi parolas nian lingvon kaj bone konas Esperanto-movadon. Dum la jarperiodo 1970-1980 ŝi aktivis en junulara Klubo JUNECO. Post sendependiĝo de Litovio ŝi transiris al diplomatia laboro kaj dum kelkaj jaroj laboris en litovia ambasado de Londono, poste de Vaŝingtono. En lastaj jaroj ŝi laboris en ministerio pri eksterlandaj aferoj de Litovio pri ekonomia strategio. *Informis Povilas Jegorovas*

## Malferma Tago en la Centra Oficejo

### Sabaton, la 27$^{an}$ de novembro

Tiu ĉi populara aranĝo estas jam 10-jara, ĉar ĝi estis unuafoje aranĝita en novembro 1994. Origine la laborantoj de la CO celis okazigi ĝin nur de tempo al tempo, sed multaj el la okdeko da vizitantoj de la premiero estis tiom fascinitaj de ĝia hejmeca etoso, ke ili petis baldaŭan ripeton. Ĝi sekvis jam aprile 1995 kaj estigis seninterrompan tradicion de du **Malfermaj Tagoj** ĉiujare.

En novembro la vizitantoj povos renkonti du renomajn nuntempajn Esperanto-verkistojn. La hispano Jorge Camacho prezentos du poemarojn el sia plumo, ĵus lanĉitajn de eldonejo BERO: CELAKANTOJ kaj SATURNO. Lia rusa kolego Mikaelo Bronŝtejn priparolos sian novan romanon DEK TAGOJ DE KAPITANO POSTNIKOV. Krom tiu prezentado, la konata bardo de Esperantujo ankaŭ kantos. Al la muzika programo kontribuos ankaŭ la nederlanda grupo AKORDO, de kiu lastatempe aperis disko kun kristnaskaj kantoj.

Unu el la firmaj tradicioj de la **Malferma Tago** estas fortaj rabatoj en la libroservo de UEA. Ankaŭ ĉi-foje ĉiuj varoj estos rabatitaj je 10 procentoj kaj multaj titoloj eĉ pli. Krome eblos gajni libron aŭ alian esperantaĵon en senpaga loterio. Historiaj trezoraĵoj de la Biblioteko HECTOR HODLER estos prezentataj en ekspozicio, kaj kafo kaj teo varmos la tutan tagon.

La **Malferma Tago** de la 27$^{a}$ de novembro disvolviĝos de la 10$^{a}$ ĝis la 17$^{a}$ horo. La oficistoj de UEA varme invitas esperantistojn viziti sian propran domon en Nieuwe Binnenweg 176, Roterdamo.

## PASPORTA SERVO: urĝa peto

La italaj pasportservuloj kiuj ankoraŭ ne konfirmis sian aliĝon kiel gastigantoj, faru tion tuj por ne malaperi el la listo! Por simpligi la proceduron skribu aŭ telefonu al mi. Dezirataj estas novaj gastigantoj precipe en ĉefaj italaj urboj kie ne mankas samideanoj, kiaj Milano, Romo, Napoli, Trieste, Genova. Serĉata landa organizanto!

Ne prokrastu: tuj konfirmu aŭ aliĝu al la
**PASPORTA SERVO**.
Skribu aŭ telefonu al:
gbronzetti@disvastigo.it - 0871561301

Pasporta Servo estas internacia servo de Tutmonda Esperanto-Junulara Organizo, kiu kunligas homojn, kiuj emas esti gastigantoj dum kelkaj tagoj por vojaĝantaj esperantistoj. Retan konfirmilon vi trovas ĉe: http://www.tejo.org/ps/konfirmilo_form.htm aŭ skribu viajn datenojn al: oficejo@tejo.org.

### La libro EDMOND PRIVAT: LA VITA E L'OPERA prezentota ĉe UILM en Milano

Vendredon la 26$^{an}$ de novembro 2004, je 15h00 en Salono Meucci de Universitato IULM (via Carlo Bo 1, 20143 Milano - metrostacio Romolo), d-ino Perla Martinelli prezentos sian verkon, eldonitan de Itala Interlingvistika Centro. Enkondukos la Vicrektoro prof. d-ro Mario Negri.

La verko estas bazita sur la unua doktoriĝa disertacio en itala lingvo (universitato de Ĝenovo) dediĉita al la fama pioniro de Esperanto. Ĝi estas ankaŭ la plej kompleta pri Edmond Privat, ĉar ĝi traktas ĉiun faceton de lia aktive-

co: trilingva verkisto kaj publicisto, apostolo de la paco, standardisto de la sendependiĝo de ĉiuj ne liberaj popoloj, amiko de Gandhi, religia sinkretisto, mondfederalisto, socialisto kaj, kompreneble, ambasadoro de Esperanto. Esperanto estas fakte la sola komuna matrico kiun oni retrovas en ĉiu lia aktiveco, apud certa interpreto pri la svisa identeco.

## Komune festi la Novan Jaron!

Jam 92 aliĝoj por la 3ᴬ NOVJARA RENKONTIĜO de EsperantoLand, en kastelo Marienburg apud Mozelo.
Ĝi okazos de la 27ª de decembro 2004 ĝis la 3ª de januaro 2005 en la kastelo Marienburg apud Mozelo (meze inter Trier kaj Koblenz en Germanio). Jen bona okazo por festi kaj pasigi agrablajn jarfinajn kaj jarkomencajn tagojn en agrabla internacia rondo: fakte ĝis nun jam alvenis pli ol 50 aliĝoj el eksterlando, kio garantias bele internacian etoson kun partoprenantoj el deko da landoj.
**Multspeca programo**: prelegoj kaj kursoj, promenoj kaj vesperaj amuziĝoj, dancoj klasikaj kaj modernaj, aŭ tutĝuaj babiladoj en la internacia kafeja rondo.
**Ĉiuj bonvenas** En la aranĝo bonvenas ĉiuj aĝogrupoj: aliĝis jam pli ol deko da infanoj, multaj mezaĝuloj kaj pliaĝuloj.
**Lerni kaj tuj apliki Esperanton** Por komencantoj oni organizos iom intensan kurson dum la unuaj tagoj por permesi rapidan eniron en Esperantujon kaj agrablan ĉeeston en la Novjara Renkontiĝo.
**Ĉu vi ŝatos esperantumi novjare?** Tiam vizitu la retopaĝon http://www.EsperantoLand.org/nr pri la 3ª NOVJARA RENKONTIĜO, kaj vidu fotojn de la domo kun la ĉarma valo de la rivero Mozelo, kaj aliĝu aŭ direktu viajn demandojn al: lu@esperantoland.org.

## Solvo de kvizo

En la septembra/oktobra numero de TEA-BULTENO vi estis invitita solvi kvizon pri ĉina lingvo. Alvenis lavango da solvoj, sed nur unu donis la ĝustajn respondojn. Nu, ne decas, ke redaktanto tiel senhonte mensogu, mi diru la veron: fakte nur unu persono alsendis la tradukon de la cititaj vortoj. Jen la rezulto:

**Ni hao** → Saluton! **Wo bu yao** → Mi ne deziras
**Dui bu qi** → Mi bedaŭras **Xie xie** → Dankon!
**Tai gui le** → Tro multekosta

Al la tre brava solvinto, d-ro Pier Giorgio Soranzo, TEA tuj elsendos la meritītan premion:
Kasedon aŭ DVD-disketon (laŭ lia prefero)
pri la 89ª UK de Pekino
Gratulojn kaj bonan spektadon al la gajninto!

## VORTARO
## ESPERANTO-ITALIANO/ITALIANO-ESPERANTO

De Umberto Broccatelli, eldonita de *Casa Editrice Zanichelli*, cm 130x178, paĝ 520, prezo € 14,60.
La libro estas jam nun aĉetebla en ĉiuj libro-vendejoj.

LA GAZETO

En ĝi diversnaciaj aŭtoroj skribas, klare kaj klere, pri ĉiaj temoj por internacia legantaro!
Eblas iam ajn komenci abonon! Petu pliajn informojn kaj malnovajn ekzemplerojn al la peranto por Italio:
Elda Doerfler, testudo@adriacom, Poŝtkonto 17452996

## Esperanto-Filatelo

Se io filatela rilata al Esperanto aperas ie tra la mondo, kaj pri ĝi ion vi ekscias, vi estas varme petata sendi la koncernajn informojn al ELF-AREK, la Esperanto-Ligo de filatelistoj kaj de esperantaĵkolektantoj. Des pli da detaloj vi aldonos, ju pli dankaj ni estos: estas bezonate ekscii, kio fakte aperis (ĉu poŝtmarko, ĉu oficiale eldonita de koncerna Poŝta Ministerio aŭ ĉu private farita; ĉu stampo, ĉu tutaĵo, ktp ktp), kioma kvanto da ekzempleroj, eldondato ks. Se temas pri glumarkoj aŭ poŝtkartoj kun teksto en esperanto, aŭ telefonkartoj, aŭ insignoj, aŭ aliaj esperantaĵoj, same klopodu ricevi ĉiajn eblajn priskribojn/sciigojn. Por ke ĉiam estu ĝisdatita la Katalogo, kiu prezentas ĉion aperintan ekde la unuaj jaroj de Esperanto kaj ties movado, estas dezirinda ĉies kunlaboro, eĉ ankaŭ de tiuj kiuj entute ne havas intereson pri kolektado, sed kiuj tamen interesiĝas pri la historio de nia movado.
Laŭ onia prefero, informoj estas sendendaj al unu el la ĉi-sube indikitaj personoj:
Rudolf BURMEISTER - Max-Muller-Str. 62, DE-09123 Chemnitz, rudolf.burmeister@arcor.de, redaktoro de LA VERDA LUPEO, informilo de ELF-AREK, kiu aperas trifoje jare;
Hermann HEISS - Lohstr. 48, DE-77704 Oberkirch, prezidanto de ELF-AREK;
Elda DOERFLER - Via del Bosco 24, IT-34131 Trieste, testudo@adriacom.it, vicprezidanto de ELF-AREK.
Koran antaŭdankon pro la kunlaboro!

---

**Grandioza sukceso por Esperanto-Muzeo de Vieno**

En oktobro, esperantistoj partoprenis en la "*Longa nokto de la muzeoj*", en Vieno, Aŭstrio. Estis kalkulite, ke la suma nombro de vizitantoj estis 1025. Pri tio jene raportis, en la momento mem de la okazaĵo, prof. Herbert Mayer en la listo austraj-esperantistoj@yahoogroups.de: "Por tiuj, kiuj konas la Muzeon: la kurso estas en la meza ĉambro. Post prezento de Atilio mi ne plu povas reiri al la Muzea salono, ĉar estas tiom da homoj en la kursejo. Mi ĵus telefonis kun mia kolego Christian, kiu sidas ĉe la enirpordo. Kun li estas ĵurnalistino de ORF, kiu per speciala ilo kalkulas la enirantojn. En la nuna momento, do, je la 22h25, jam estas 662 personoj. Estas mirinde, kiom pozitive rilatas la publiko al Esperanto!" Pli poste li aldonis: "Do, ĉi-jare ni pasis la limon de 1000 personoj, kiuj vizitis la Esperanto-muzeon ene de ses horoj. Minimume triono partoprenis en la kursoj de Ed Borsboom kaj de Atilio Orellana Rojas de la Internacia Esperanto-Instituto".

---

*Fonto por la informoj: **RET-INFO**, **NUN** kaj **NOVA SENTO***

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste
**tel/fakso**: +39 040 763128
**Reto**: esperantotrieste@adriacom.it; nored@tele2.it
**http**://arte.triesteincontra.it/esperanto
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349